Név: ..... osztály:.....

ÉRETTSÉGI VIZSGA • 2018. május 25.

ESZPERANTÓ NYELV

KÖZÉPSZINTŰ ÍRÁSBELI VIZSGA

2018. május 25. 8:00

I. Olvasott szöveg értése

Időtartam: 60 perc

Pótlapok száma	
Tisztázati	
Piszkozati	

EMBERI ERŐFORRÁSOK MINISZTÉRIUMA

Név: ..... osztály:.....

Fontos tudnivalók

Szótár **nem** használható!

1. Legu la tekston kaj decidu ĉu la subaj frazoj estas veraj aŭ malveraj.
(0) estas ekzemplo por vi.

En kelkaj regionoj de la montaro Alpoj oni povas observi ibeksojn*, tiujn imponajn sovaĝajn kaprojn, kies kornoj formas grandegan duoncirklon. Tiuj grandaj alpaj kaproj, kiuj longas unu metron kaj duono, altas ĉe la kolo preskaŭ unu metron kaj pezas ofte pli ol cent kilogramojn malrapide fuĝas, kiam alvenas homoj, iliaj nuraj malamikoj. Ilia foriro estas tre malrapida, ofte interrompita de haltoj. Tial ili fariĝis tre facile viktimoj de ĉasistoj. Ekde la deksepa jarcento ili preskaŭ komplete malaperis. Nur kiam ilia protektado fariĝis pli efika ĉirkaŭ la jaroj 1920, ili komencis iom post iom remultiĝi en natur-protektejoj. La inoj naskas nur unu idon komence de majo, kaj tiuj bestetoj ofte mortas pro diversaj malsanoj. Tio klarigas la malrapidan kreskon de la grupo. En protektejo ilia nombro duobliĝas dum periodo de proksimume sep aŭ dek jaroj. En la naturprotektejoj, kiujn vizitadas multaj turistoj dum la tuta jaro, la ibekso alkutimiĝis al renkonto de homo. Ili komencas foriri nur kiam la promenantoj tro bruas, se ili kunhavas hundojn aŭ se ili alproksimiĝas je malpli ol dek metroj. Tial oni povas ilin observadi dum la tuta jaro. Tamen ilia vivo restas tre sekreta, ĉar ili moviĝas ĉefe nokte. Ili paŝtiĝas** frumatene antaŭ la sunleviĝo kaj vespere je la sunsubiro. Dum la plej granda parto de la tago ili ripozas sur iom kaŝita rokbalkono.
Okaze de ekskurso kun dekdujaraj gelernantoj, komence de oktobro, tre frue matene antaŭ la sunleviĝo ni iris observi la ibeksojn. Borde de roka krutaĵo ni rimarkis du virbestojn. Mi signis al la tuta klaso sidiĝi. La sovaĝaj kaproj sin alfrontis kvazaŭ malamikoj, kornoj kontraŭ kornoj. Ni aŭdis ilin spiregi. Subite ambaŭ virkaproj malantaŭeniris, kaj tuj poste ili kuregis unu kontraŭ la alian, kaj ni povis aŭdi la frapon de iliaj fruntoj. Dum ili tiel batalis, ni iom post iom alproksimiĝis. Fine, post preskaŭ duonhoro, ni konstatis, ke unu el la ibeksoj laciĝis. Kiam ĝia kontraŭulo kuris al ĝi la venkito iom post iom retiriĝis kaj malaperis en rokfendon. La venkanto revenis al ni, kvazaŭ por fiere admirigi sin. Sed tiam aperis el alia rokfendo, pli impona virkapro ol ĝi. Tiu ĉi malrapide alproksimiĝis, kaj je nia miro ni konstatis, ke la ĵusa venkinto samrapide retiriĝis el la batalkampo, ĝis kiam restis nur la nova alveninto, verŝajne la virĉefo. Kaj tuj tiu impona bestego komencis tute kviete paŝtiĝi antaŭ la observantoj.

(Laŭ Claude Gacond: Radioprelegoj, 1981.)

**ibekso: muflon, hegyi kecske*
***paŝtiĝi: legelni*

	V	**M**
0. La alpaj kaproj tuj malaperas, se ili rimarkas homon.		*X*
1. En la 1920-aj jaroj oni tute ne protektis ibeksojn.		
2. La ibekso ne ŝatas bruon.		
3. La nombro de ibeksoj dum duonjaro dekobliĝis.		
4. La ibekso dormas nokte, kaj tage ĝi manĝas.		
5. La klasa ekskurso okazis aŭtune.		
6. Dum la ekskurso ili vidis entute tri virkaprojn.		
7. La lasta kapro estis la malplej forta.		

1.	**2.**	**3.**	**4.**	**5.**	**6.**	**7.**	**Max.**	**Elért**
							7	

2. Legu la historion de Billy, kiu volis iĝi orministo*.
El la teksto mankas vortoj. Vi trovas ilin sube en alfabeta vicordo.
Skribu ilin laŭ ilia apero sur la liniojn! Uzu ĉiun vorton nur unufojon!
(0) estas ekzemplo por vi.

~~oron~~, bieron, drinkado, ekspedicio, konsiloj, malofte, mapon, marmalsano, riĉeco, senpage, sumon, surprizo

Billy Dixon volonte ekirus tuj serĉi ___0___, sed estis du problemoj: neniu sciis, kie estas tiu oro, kaj due li devis unue enspezi iom da mono por sia ___8___. Bonŝance li trovis laboron preskaŭ tuj. Sinjoro *Johnson*, la posedanto de Hotelo Cigno, ĵus maldungis kelneron pro troa ___9___. Kiam *Billy* sin prezentis, sinjoro *Johnson* demandis simple, „Ĉu vi ŝatas ___10___?”. Li respondis, „Ne tro.” Kaj li estis dungita.
Billy diligente laboris por sinjoro *Johnson* kaj ŝparis monon. Lia salajro estis tre modesta, sed ĉar li loĝis ___11___ en la hotelo kaj ĉar li ___12___ trinkis alkoholon, ĉiusemajne li povis ŝpari kelkajn ŝilingojn, kaj li revis pri la tago, kiam li surŝipiĝos kaj ekveturos al nordo, al la haveno, kiu estas plej proksime al la orminejoj.
Li estis jam ses monatojn en Perto kaj ŝparis modestan ___13___, kiam la ekscita informo disvastiĝis: oni trovis oron en loko nomata *Hall's Creek*. *Billy* tuj aĉetis parton de la materialo laŭ la ___14___ de maljunulo, kiu trovis iom da oro en Kalifornio en 1849. La manko de spertoj kaj scioj tute ne malaltigis la fervoron de *Billy*.
„Vi povos atingi *Hall's Creek* aŭ el *Derby* aŭ el *Wyndham*,” diris la grizbarba eksministo. „Mi rigardis la ___15___. El *Derby* estas 600-mejla marŝo trans relative ebena tereno, kaj estas kelkaj bienoj survoje. El *Wyndham* la distanco estas nur 400 mejloj, sed la pejzaĝo estas monta kaj ŝtona. Se mi estus vi, mi irus de *Derby*.”
Do *Billy* decidis elŝipiĝi en *Derby*. De tie nur 600 mejloj apartigus lin de ___16___. Sed kiam li surŝipiĝis, estis malagrabla ___17___ konstati, ke li ne estas la sola kun tiaj revoj. Centoj da viroj volis serĉi oron: instruistoj, bankoficistoj, advokatoj, ĉarpentistoj, vendistoj, metiistoj, preskaŭ ĉiu socia tavolo estis reprezentata. Krome la malnova malamiko de *Billy*, la ___18___, baldaŭ aperis. Li estis malsana dum granda parto de la vojaĝo, kaj li apenaŭ rimarkis, ke la marbordo kun la montetoj daŭre glitas suden. Li rimarkis kun maltrankvilo, ke ĉiam, kiam ili haltis ĉe haveno, pli da viroj surŝipiĝis, kun la sama celo kiel li.

(Laŭ Trevor Steele: El la taglibro de Billy Dixon)

**orministo: aranyásó, aranymosó*

0. _____*oron*_____
8. _____
9. _____
10. _____
11. _____
12. _____
13. _____
14. _____
15. _____
16. _____
17. _____
18. _____

8.	9.	10.	11.	12.	13.	14.	15.	16.	17.	18.	Max.	Elért
											11	

3. Sube estas la demandoj kaj respondoj de intervjuo. Serĉu la konvenan respondon al la demandoj, kaj enskribu ties literon en la tabelon.
(0) estas ekzemplo por vi.

0. Ĉu vi povas rakonti kiel komenciĝis la retkurso de Esperanto, en la itala lingvo?

19. Kiom da homoj laboras por la kurso?
20. Kiom da kursanoj vi havis ĝis nun?
21. Ĉu la partoprenantoj ofte ĉesas la kurson?
22. Kia estas via kurso?
23. Ĉu ekzistas homoj, kiuj post la kurso ekinteresiĝas pri la movado kaj partoprenas en renkontiĝoj?
24. Kian konsilon vi povas doni al homoj, kiuj volas traduki la retkurson al sia lingvo?
25. Mi pensas, ke kiam homo kutimas uzi Interreton, li ne tiom emas partopreni en aranĝoj kaj eble estas malfacile paroli en reala situacio kun aliaj homoj, ĉu ne?

A) Mi havas dekdu kunlaborantojn, kiuj korektas la ekzercojn.

B) Kiam oni konas iun pere de Interreto, oni konas lin tute alimaniere ol persone. Se oni renkontiĝas en la reala mondo, oni povas ege surpriziĝi.

C) *Mi tradukis ĝin el la angla antaŭ pli ol du jaroj, ĉar mi ekinteresiĝis pri Esperanto ĝuste pere de Interreto, kaj mi kun surprizo malkovris, ke mankis kurso en la itala.*

D) La ĉefa problemo estas, ke la plej granda parto de la kontaktoj ne estas serioza persono, kaj ne finas la kurson.

E) Valoras havi tian kurson, ĉar tio donas al Esperanto modernan bildon. La korektanto kaj la zorganto ĝoju pro tiuj, kiuj finfaras la kurson.

F) Ĝi estas ege baza, elementa. Ĝi havas nur dek lecionojn, nur retpoŝta, ĝi ne havas parton pri prononco, sed simple tradukendajn frazojn.

G) En du jaroj ni havis pli-mapli ducent kontaktojn. Mi nomas *kontakto* homon, kiu skribis al ni leteron kaj komencis almenaŭ la unuan lecionon.

H) Tio estas la fina celo de la kurso. Post la kurso la lernantoj jam havas minimuman bazon por komprenigi sin kun aliaj.

(Laŭ Kontakto apr. 1999)

0.	**19.**	**20.**	**21.**	**22.**	**23.**	**24.**	**25.**
C							

19.	**20.**	**21.**	**22.**	**23.**	**24.**	**25.**	**Max.**	**Elért**
							7	

		pontszám	
		maximális	elért
I. Olvasott szöveg értése	1. feladat	7	
	2. feladat	11	
	3. feladat	7	
Feladatpont összesen		**25**	
VIZSGAPONT ÖSSZESEN		**33**	

dátum javító tanár

---

	pontszáma **egész számra** kerekítve	
	elért	programba beírt
I. Olvasott szöveg értése		

dátum dátum

javító tanár jegyző

Megjegyzések:
1. Ha a vizsgázó a II. írásbeli összetevő megoldását elkezdte, akkor ez a táblázat és az aláírási rész üresen marad!
2. Ha a vizsga az I. összetevő teljesítése közben megszakad, illetve nem folytatódik a II. összetevővel, akkor ez a táblázat és az aláírási rész kitöltendő!

Név: ..... osztály:.....

ÉRETTSÉGI VIZSGA • 2018. május 25.

ESZPERANTÓ NYELV

KÖZÉPSZINTŰ ÍRÁSBELI VIZSGA

2018. május 25. 8:00

II. Nyelvhelyesség

Időtartam: 30 perc

Pótlapok száma	
Tisztázati	
Piszkozati	

EMBERI ERŐFORRÁSOK MINISZTÉRIUMA

Név: ..... osztály:.....

Fontos tudnivalók

Szótár **nem** használható!

**1. En la teksto mankas prepozicioj, kiujn vi trovas sube en alfabeta ordo.
Skribu ilin en la tabelon laŭ ilia aper-ordo. Uzu ĉiun prepozicion nur unu foje!
(0) estas ekzemplo por vi.**

al, antaŭ, apud, dum, ~~en,~~ kun, por, sub, tra

La erinaceto Susurĉjo kaj lia familio vivis _____*0*_____ bela urba parko _____1_____ la stumpo* de malnova kaŝtana arbo. _____2_____ la tago la parko estis plena de infanoj, kiuj kriis, kuris, ridis, kverelis farante grandan bruon. Estis tie ankaŭ promenantoj, kiuj pasadis _____3_____ la parko trankvile kaj silente. Nokte la parko tute retrankviliĝis, nur maloftaj preterpasantoj rompis la silenton. Tiam la erinacoj eliradis el sia dumtaga kaŝejo. Ili serĉis restojn de manĝaĵo. Tio estis _____4_____ ili la plej ŝatata manĝofesto. Kaj _____5_____ la mateno ili ĉiam reiris _____6_____ sia loĝejo.
_____7_____ la parko estis granda trafikplena ŝoseo _____8_____ multaj trafiklumoj. Bedaŭrinde ofte okazis akcidentoj tie. Tial la zorgoplenaj gepatroj instruis la erinacetojn, ke ili atentu, kiam ili transiras ĝin. Kaj speciale ili gardu sin se proksimiĝas tiuj teruraj metalaj monstroj, kiuj tiel abomene bruas, aĉe odoras kaj havas terurajn lumojn _____*0*_____ la okuloj. Ili volis diri: estu singardaj, se venas aŭtomobiloj.

(Laŭ Antoaneta Klobučar: Rakontoj sub la lito)

**stumpo: fatönk*

0.	**1.**	**2.**	**3.**	**4.**	**5.**	**6.**	**7.**	**8.**
en								

1.	**2.**	**3.**	**4.**	**5.**	**6.**	**7.**	**8.**	**Max.**	**Elért**
								8	

2. Elektu la ĝustan formon, kaj enskribu ties literon en la suban tabelon.
(0) estas ekzemplo por vi.

La pasero adaptiĝis al la urba vivo tiel, ke ĝi lernis manĝi preskaŭ ĉion, nesti kie ajn. Ni trovas iliajn nestojn sur _____*0*_____, sub la tegmentoj, en truoj de malnovaj _____9_____, eĉ ene de malnovaj kaj forlasitaj aŭtoj.
Ŝajnas, ke tiu _____10_____ havas ion por instrui al ni homoj. Aŭ ni homoj devas lerni de ili kiel vivi en malfavoraj kondiĉoj, fariĝante pli toleremaj kaj _____11_____.
La paseroj lernis de la medio kiel vivi eĉ kun la _____12_____ de aliaj. Ĉu la manĝaĵoj estas _____13_____ aŭ semoj, grajnoj aŭ fruktoj tio ne gravas.
Ili vivas kaj donas vivon al siaj _____14_____ per tiu ĉi rubo de la homa civilizo. Ilia humileco kaj adaptiĝemo permesas al la paseroj postvivi meze de la malordo de la grandaj urboj, same kiel en la _____15_____.
Kiam la naturo ekdormas, kaj ili sentas ke la Suno eksubiras, ili _____16_____ amase meze de ĉiam sama arbo kaj tie ili varmigas unu la alian kaj laŭte babilas. Eĉ tuta armeo de katoj aŭ _____17_____ ne sufiĉas por ekstermi ilin, ĉar ili ne vivas individue, sed ili havas kolektivan vivstilon.

(Laŭ Kontakto jun. 1999)

0. A) brancĉejo	*B) <u>brancĉaro</u>*	*C) brancĉujo*	*D) brancĉulo*
9. A) konstruistoj	B) konstruebloj	C) konstruaĵoj	D) konstruoj
10. A) birdido	B) birdego	C) birdulo	D) birdeto
11. A) fleksitaj	B) flekseblaj	C) fleksuloj	D) fleksigaj
12. A) restejoj	B) restintoj	C) restaĵoj	D) restado
13. A) paneroj	B) panegoj	C) panidoj	D) paniloj
14. A) paseruloj	B) paseregoj	C) paseraroj	D) paseridoj
15. A) kampejo	B) kamparo	C) kampulo	D) kampadilo
16. A) kuniĝas	B) kunigas	C) kunendas	D) kuneblas
17. A) kaptaĵoj	B) kaptiloj	C) kaptejoj	D) kaptinoj

0.	**9.**	**10.**	**11.**	**12.**	**13.**	**14.**	**15.**	**16.**	**17.**
B									

9.	**10.**	**11.**	**12.**	**13.**	**14.**	**15.**	**16.**	**17.**	**Max.**	**Elért**
									9	

3. En la teksto mankas tabelvortoj, kiujn vi trovas sube en alfabeta ordo.
Skribu ilin en la liston laŭ ilia aper-ordo.
(0) estas ekzemplo por vi.

iom, iu, kiam, kiom, kion, kiu, kiuj, ~~tie~~, neniun

Antaŭ kelkaj jaroj ofte mi iradis tra subtera trairejo, proksime al haltejo de metroo. _____*0*_____ mi vidis malaltan maljunulon kun malgrandaj kudritaj bestoj en la mano.
La maljunulo havis purajn, kvankam ne tre novajn vestojn. Li staris senvorte, malkuraĝe, li tenis en la mano la malgrandajn bestetojn. Preskaŭ per la okuloj li petis la homojn, _____18_____ iradis antaŭ li, ke ili aĉetu de li la bestojn. Sed mi vidis eĉ ne unu homon halti apud li.
Mi imagis malgrandan maljunulinon, _____19_____ sidas en malgranda ĉambro, kaj faradas de mateno ĝis vespero la bestetojn, por ke ili povu ricevi _____20_____ da mono vendante ilin. Kaj vespere ŝi maltrankvile atendas la maljunulon: _____21_____ da bestoj li forvendis?
_____22_____ mi vidis, ke la maljunulo nur staras kaj atendas, ke _____23_____ aĉetu finfine besteton de li, mi pensis, ke mi iros al li. Sed _____24_____ mi faru kun la besteto, ja mi konas _____25_____ infanon por donaci ĝin al li. Aĉeti, poste forĵeti ĝin mi tute ne volis. Sed samtempe mi havis malagrablan senton, ĉar mi ne povis helpi al la silenta, soleca maljunulo.

(Laŭ János Sárközi: Paĝoj por komencantoj)

0. ____*Tie*___

18. _____

19. _____

20. _____

21. _____

22. _____

23. _____

24. _____

25. _____

18.	19.	20.	21.	22.	23.	24.	25.	Max.	Elért
								8	

		pontszám	
		maximális	elért
II. Nyelvhelyesség	1. feladat	8	
	2. feladat	9	
	3. feladat	8	
Feladatpont összesen		**25**	
VIZSGAPONT ÖSSZESEN		**18**	

dátum javító tanár

---

	pontszáma **egész számra** kerekítve	
	elért	programba beírt
I. Olvasott szöveg értése		
II. Nyelvhelyesség		

dátum dátum

javító tanár jegyző

Megjegyzések:
1. Ha a vizsgázó a III. írásbeli összetevő megoldását elkezdte, akkor ez a táblázat és az aláírási rész üresen marad!
2. Ha a vizsga a II. összetevő teljesítése közben megszakad, illetve nem folytatódik a III. összetevővel, akkor ez a táblázat és az aláírási rész kitöltendő!

Név: ..... osztály:.....

ÉRETTSÉGI VIZSGA • 2018. május 25.

ESZPERANTÓ NYELV

KÖZÉPSZINTŰ ÍRÁSBELI VIZSGA

2018. május 25. 8:00

III. Hallott szöveg értése

Időtartam: 30 perc

Pótlapok száma	
Tisztázati	
Piszkozati	

EMBERI ERŐFORRÁSOK MINISZTÉRIUMA

Fontos tudnivalók

Szótár **nem** használható!

A vizsgához mellékelt hanghordozó tartalmazza a vizsga teljes hanganyagát (a szükséges szünetekkel együtt).

Saluton! Nun sekvos la aŭskulta parto de la abiturienta ekzameno.
Vi aŭdos ĉiujn tekstojn dufoje, kaj vi devos solvi la taskojn en tiu ĉi kajereto.

- **Ĉiu tasko komenciĝos kaj finiĝos per muziko. Poste vi aŭdos la instrukciojn (vi povos ilin ankaŭ legi antaŭ ĉiu tasko).**
- **Post tio vi havos tempon legi la tutan taskon.**
- **Tiam vi aŭdos la tekston la unuan fojon.**
- **Denove sekvos silento.**
- **Poste vi aŭdos la tekston la duan fojon.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

La tuta ekzameno daŭros 30 minutojn. Bonan laboron!

1. Aŭskultu tekston pri japana festo. Laŭ tiu teksto kompletigu la frazojn!
(0) estas ekzemplo por vi.

*0. La 11-a de februaro estas la nacia tago en **Japanio**.*

1. Oni celebras la feston de Sankta Valenteno _____ tagojn poste.
2. La festado komenciĝis antaŭ _____ jaroj.
3. En tiu tago _____ povis konfesi sian amon.
4. La virinoj donacis malmultekostajn ĉokoladojn al la _____,
5. kaj _____ ĉokoladon al la amato.
6. Pro la festo la ĉokolado-kompanioj gajnis _____ de la dumjara profito.
7. Pro la ekonomia krizo ekestis en la oficejoj _____ etoso.
8. Oni daŭre importas ĉokoladon el _____.
9. Nun oni tre ŝatas la ĉokoladon kun aromo de _____ teo.

1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.	8.	9.	Max.	Elért
									9	

2. En la dua tasko vi aŭdos informojn pri Danio. Laŭ ĝi parigu la ciferojn kaj la tekstojn! Vian solvon skribu en la tabelon!
(0) estas ekzemplo por vi.

A	18-25	*kvadrataj kilometroj estas la areo de Danio.*	*0.*
B	1,2 milionoj	insuloj troviĝas en Danio.	10.
C	5,5 milionoj	estas loĝataj el la danaj insuloj.	11.
D	11	estas la nombro de loĝantoj.	12.
E	72	da homoj loĝas en Kopenhago.	13.
F	96	metrojn super la marnivelo estas la pleja alta punkto de Danio.	14.
G	*43.098*	gradoj estas la meza temperaturo en julio.	15.
H	173	estas la jaro, kiam Danio membriĝis en la Eŭropa Unio.	16.
I	215	kronoj estas la prezo de septaga bileto por du zonoj.	17.
K	350	kilometroj da biciklaj vojoj troviĝas en Kopenhago.	18.
L	443	estas la numero de la buso per kiu oni povas veturi tra la antikva urbo.	19.
M	1972	-a Universala Kongreso okazis en Kopenhago en julio 2011.	20.

0.	**10.**	**11.**	**12.**	**13.**	**14.**	**15.**	**16.**	**17.**	**18.**	**19.**	**20.**
G											

10.	**11.**	**12.**	**13.**	**14.**	**15.**	**16.**	**17.**	**18.**	**19.**	**20.**	**Max.**	**Elért**
											11	

		pontszám	
		maximális	elért
III. Hallott szöveg értése	1. feladat	9	
	2. feladat	11	
Feladatpont összesen		**20**	
VIZSGAPONT ÖSSZESEN		**33**	

dátum

javító tanár

---

	pontszáma **egész számra** kerekítve	
	elért	programba beírt
I. Olvasott szöveg értése		
II. Nyelvhelyesség		
III. Hallott szöveg értése		

dátum

javító tanár

dátum

jegyző

Megjegyzések:
1. Ha a vizsgázó a IV. írásbeli összetevő megoldását elkezdte, akkor ez a táblázat és az aláírási rész üresen marad!
2. Ha a vizsga a III. összetevő teljesítése közben megszakad, illetve nem folytatódik a IV. összetevővel, akkor ez a táblázat és az aláírási rész kitöltendő!

Név: ..... osztály:.....

ÉRETTSÉGI VIZSGA • 2018. május 25.

ESZPERANTÓ NYELV

KÖZÉPSZINTŰ ÍRÁSBELI VIZSGA

2018. május 25. 8:00

IV. Íráskészség

Időtartam: 60 perc

Pótlapok száma	
Tisztázati	
Piszkozati	

EMBERI ERŐFORRÁSOK MINISZTÉRIUMA

Fontos tudnivalók

Szótár használható.

Piszkozat – a feladatokra fordítható idő miatt inkább vázlat – készíthető a vizsgafüzet üres oldalain, illetve külön piszkozatlap(ok)on.

Ügyeljen a megadott szószámra!

Amennyiben a létrehozott szöveg jelentősen eltér (rövidebb, hosszabb) a megadott szóintervallumtól, az pontlevonással jár.

1.
Nuntempe oni multe parolas pri la graveco de la unua helpo. En via lernejo kun kelkaj geknaboj vi decidis, ke vi organizos kurson pri unua helpo.

Skribu anoncon por la gelernantoj pri la kurso. En ĝi vi skribu

- pri la celo de la kurso
- kie, kiam, kiomofte ĝi okazos
- kiun kontakton vi havos kun ambulanca servo (vizito, invito)

Skribu vian 80-100 vortan anoncon sur la unuan respondfolion!

Unua respondfolio

1.	2.

2.
Vi legis la sekvan artikolon:

PERDU LIBRON!

En Hungario de kvar jaroj ekzistas movado: Perdu libron!
Se iu volas „perdi” libron, metas mesaĝon en la libron: „Mi intence perdis tiun ĉi libron. Legu kaj ankaŭ vi perdu ĝin!” La movado havas hejmpaĝon, kie oni povas registri la libron kaj sekvi ĝian vojon. Ĝis nun jam 3000 libroj perdiĝis.

Skribu leteron al via eksterlanda amiko pri la temo. En via letero skribu

- **pri la movado,**
- **kial la ideo plaĉas aŭ ne plaĉas al vi,**
- **pri la libroj, kiujn vi perdus kaj kiujn vi volonte trovus.**
- **Demandu la opinion de via amiko.**

Skribu vian 100-120 vortan leteron sur la duan respondfolion!

Dua respondfolio

1.	2.	3.

		pontszám	
		maximális	elért
IV. Íráskészség	A feladat teljesítése, a megadott szempontok követése	5	
	Nyelvhelyesség és íráskép	5	
	1. feladat	**10**	
	A feladat teljesítése, a megadott szempontok követése	5	
	Szövegalkotás	5	
	Formai jegyek és hangnem	3	
	Szókincs, kifejezésmód	5	
	Nyelvhelyesség és íráskép	5	
	2. feladat	**23**	
VIZSGAPONT ÖSSZESEN		**33**	

dátum

javító tanár

---

	pontszáma **egész számra** kerekítve	
	elért	programba beírt
I. Olvasott szöveg értése		
II. Nyelvhelyesség		
III. Hallott szöveg értése		
IV. Íráskészség		

dátum

dátum

javító tanár

jegyző